

# Pri Esperanto kaj la Somera Tempo

■ Amir Naor

Estas surpriza simileco inter Esperanto kaj la somera tempo – du revoluciaj ideoj proponitaj de du geniaj viziuloj. Tiuj ideoj ŝajnas unuavide simplaj, tamen tre malfacilas realigi ilin, ĉar la tuta komunumo devas adopti ilin samtempe. Somera tempo ege sukcesis, kaj estas nun konata kaj uzata ĉirkaŭ la mondo. Esperanto ankoraŭ ne atingis la rekonon kaj akcepton de la ĝenerala publiko.

En 1784 alvenis al Parizo, la “Urbo de la Lumo”, la unua usona ambasadoro. Lia nomo estis Benjamin Franklin – filantropo, verkisto, diplomato, unu el la fondintoj de Usono, fama inventisto kaj sciencisto (li pruvis, ke la fulmo estas elektra fenomeno, kaj inventis la fulmoŝirmilon, la artefaritan naĝilon kaj la du-fokusajn okulvitrojn). Vidante la viglan parizan noktovivon, li rimarkis, estante la filo de kandelisto, la grandan konsumon de lum-kandeloj (nur jarcenton poste la elektraj lumiloj estis inventitaj). Benjamin Franklin estis praktika homo, kaj elpensis originalan ideon pri kiel ŝpari kandelojn. Li sendis detalan leteron al pariza ĵurnalo, kaj proponis “movi” la horojn de la tago, kaj vekigi unu horon pli frue, por akiri plian tagluman horon vespere. Tio estis brila ideo pro ĝia simpleco, samkiel ideoj, pri kiuj la aŭskultanto pensas al si, “Kiel oni ne pensis pri tio antaŭe” aŭ “mi povus eltrovi ĝin mem.” Sed je dua penso, tia ideo tute ne aplikeblas facile, ĉar ĉiuj homoj devas ŝangi siajn kutimojn samtempe. Efektive, neniu traktis tiam serioze la ideon. Cent jaroj pasis, kaj ekaperis ĉirkaŭ la mondo aliaj proponoj enkonduki someran tempon – unue en Nov-Zelando, poste en Anglio kaj Usono. Pli kaj pli da homoj subtenis la ideon, sed ne sukcesis antaŭenigi ĝin.


La trarompo okazis subite, dum traŭmata evento – la Unua Mondmilito. Dum la milito ekestis en Eŭropo severa

manko de karbo, kaj en 1916 Germanio enkondukis someran tempon, kaj poste faris la samon ankaŭ Anglio, Rusio kaj Usono. Ekde tiam somera tempo iĝis akceptita tutmonde, kaj multaj landoj ŝanĝis siajn horloĝojn dufoje ĉiujare. Menciindas, ke la pravigo de somera tempo malkreskis sekve de la teknologia progreso. Plua horo de lumo vespere, kiu antaŭe ŝparis elektron por lumigado, postulas nuntempe en multaj landoj uzi elektrajn klimatizilojn, kies energia konsumo estas pli multekosta kompare al al ŝparita elektro por lumigado. Sed tamen neniu pridubas nun la someran tempon, ĉar ĉiu alkiutimiĝis al ĝi. Verŝajne ĉiu ŝatas la pluan tagluman horon vespere, uzata por distro aŭ kunesto kun la familio.

Do la somera tempo sukcesis 130 jarojn post la unua ekapero de la ideo. Kaj kvazaŭ koincide, antaŭ 130 jaroj Zamenhof unue publikigis sian Unuan Libron. Estas interesa simileco inter somera tempo kaj Esperanto. En ambaŭ kazoj, sola viziulo eltrovis ideon, kontraŭan al la kutimoj de siaj sam-

tempuloj. En ambaŭ kazoj li alportis la ideon al publika atento skribe – ĉu en gazeto, ĉu en maldika libreto. En ambaŭ kazoj la sukceso ne estis tuja. Esperanto komence eĉ pli sukcesis ol la somera tempo kaj akiris entuziasmajn subtenantojn, sed ne sukcesis trarompi la vojon al la ĝenerala publiko. La esperantistoj nuntempe koncentriĝas ĉefe konservi la esperantan kulturon, anstataŭ batali por akcepto de la ĝenerala publiko.

Ĉu tio, kion oni povas lerni el la sukceso de la somera tempo, aplikeblas ankaŭ por Esperanto? Ambaŭ ideoj postulas ŝanĝi la vivmanieron de granda grupo, do oni povus pensi, ke tiaj ideoj estus adoptitaj de ia internacia organizaĵo (kiel ekzemple la Unuiĝintaj Nacioj), kiu havas pli vastan perspektivon kaj vizion. Tiaj organizaĵoj povus antaŭenigi kaj la someran tempon kaj la instruadon de Esperanto por infanoj kiel dua lingvo tra la mondo. Sed tio ne okazis, nek por Esperanto, nek por somera tempo. Ĉiu lando decidis por si mem ĉu enkonduki la



someran tempon, kaj kian duan lingvon instrui al siaj infanoj. Do ni ne devas atendi, ke internaciaj organizaĵoj antaŭenigu nian ideon. Tutmondaj organizaĵoj neniam indikas la vojon, sed nur postsekvas la okazaĵojn. Ili povas helpi, nur post kiam la trarompo okazis.

La somera tempo debutis dum traŭmata epoko - la Unua Mondmilito. Dum milito ĉiuj sociaj sistemoj konsterniĝas, kaj sekve eblas konduki ŝanĝojn relative facile. La somera tempo profitis de tio, kaj eble ĝi neniam povus realiĝi, se la monda historio trovus alian vojon anstataŭ milito. Sed Esperanto neniam profitas de militoj - ĝi portas ideojn de paco kaj frateco inter popoloj, kaj dum militoj silentas kaj la muzoj kaj Esperanto.

Tamen la sukceso de la somera tempo devus kuraĝigi nin, ĉar ĝi pravas, ke mondnivelaj ŝanĝoj povas realiĝi, eĉ se longa tempo estas bezonata. Cirkonstancoj povas ŝanĝiĝi, kaj alporti novajn eblecojn.

Zamenhof mem estis tre realisma homo, sciante kiom malfacilas ŝanĝi la mondon kaj disvastigi sian artefaritan novan lingvon. En sia Unua Libro li prezentis originalan ideon kiel disva-

stigi la lingvon. Li tre saĝe ne penis konvinki la legantojn tuj eklerni la lingvon. Li bone komprenis, ke neniu investos tempon kaj penon lerni lingvon, kiun neniu parolas. Anstataŭe li petis de la legantoj sendi (per la poŝto...) deklaron, ke se dek milionoj da personoj konsentos lerni la lingvon - nur tiam la sendinto komencu lerni la lingvon mem. Jen interesa plano, ĉar la unua reago de iu ajn persono (tiam kaj nun), ekaŭdante pri la internacia lingvo estas - "Tio estas vere bona ideo, sed la tuta mondo ne adoptos ĝin." Tia homamaso sindeviga deklaro preterpasas la problemon, ĉar la sindeviganto ne devas agi tuj. Tial li povas subskribi la deklaron, kaj intertempe alkiutimiĝi al la ideo. Tia procezo povas konduki al kreskanta konscio kaj kredemo en la ĝenerala publiko.

Tiu Zamenhofa ideo de "Deklaro de Devigo" ne sukcesis tiame kaj estis forgesita. Sed ankoraŭ temas pri originala ideo, kaj eblas, ke ĝuste nun, en la epoko de la sociaj retoj kaj Interreto, la sama ideo povus gajni sukceson. Jen propono, kiu aspektas unuavide iluzia kaj stranga, sed fakte tiaj estas revoluciaj ideoj - UEA decidu

rekomenci la sindevigo-projekton de Zamenhof, omaĝe al la centjariĝo de sia forpaso, kaj lanĉu kampajnon varbi sindevigojn de 10 milionoj da personoj. Leteroj ne estas bezonataj nun, kaj la sindevigantoj promesu lerni Esperanton en dediĉita retejo. La varbado uzu la nunajn amaskomunikilojn - kiel *Fejsbukon* kaj *Jutubon*, ekzemple, kiuj povas atingi tre vastan cirkuladon dum mallonga tempo. Nun ni havas pli bonan deirpunkton ol tiu de Zamenhof: disponeblas nun tre efikaj kaj rektaj rimedoj atingi la publikon, kaj ni ne komencas ĉi-foje de nulo - ĉiuj esperantistoj povu aliĝi ankaŭ - inkluzive komencantoj kaj ekskomencintoj. Tio estos ŝanĝo en la agmaniero de nia movado. Sed laŭ la proverbo "Se ni faros hodiaŭ kion ni faris hieraŭ, ni ne devas miri, kial ni ricevas la samajn rezultojn". Ni devas lerni de Zamenhof pensi grandskale, celante alporti Esperanton al la tutmonda tagordo.

*La leganto estas invitata legi la Zamenhofan Unuan Libron - "Lingvo internacia". Eĉ hodiaŭ oni povas lerni unu aŭ du aferojn, pri kiel altiri la atenton de la publiko. Traduko el la rusa farita de Aleks Kerbel aperas ĉe <http://verkoj.com/lautemel/Esperanto/>.*